
ESPERANTO-INFORMILO



Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Foto: M. Walter

Rigardo al la 'Gedererwand' en la Chiemgau alpoj en decembra lumo.

La januara eldono de la Esperanto-Infomilo aperas kunredaktita de Georgo(GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono

Redaktoro teamo:

Georg Hennemann

Ulrich Fellmann

korektinto: Ulriko Felmano

**Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main**

www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender: Georg Hennemann

georg.hennemann@t-online.de

Rehgartenstr. 16

35683 Dillenburg

Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01

BIC: DRESDEFFXXX

bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende

Klub-vesperoj

Dienstag, d. 3. Jan. 23

mardon, la 3-an de jan. 23

19:00 h per Zoom

19:00 h per Zoom

Offene Sprachrunde

Malferma babila rondo

Dienstag, d. 10. Jan. 23

mardon, la 10-an de jan. 23

19:00 h per Zoom

19:00 h per Zoom

Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)

Fermita babila rondo (nur klubanoj)

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 17. Jan. 23

mardon, la 17-an de jan. 23

18:30 h surloke

**Sprachrunde: entfällt zugunsten einer
Diskussion über unsere Bibliothek**

**Lingva rondo: estas nuligita favore al diskuto
pri biblioteka prizorgado kaj katalogado**

19:30 Vortag „Mein Jahr mit Zamenhof“

Prelego "Mia jaro kun Zamenhof" de U. Fellmann

El la Klubo

Naskiĝtagoj

En januaro festos sian naskiĝtagon:

Elisabeth Rabenstein 11.01
Hartmut Horeth 20.01
Martin Schmitt 21.01

Ni kore gratulas!

Esperantujo

Opinio de Georg Hennemann kaj deziro por la venonta jaro

Kiom da personoj bezonatas por estigi bone funkcia grupo? Tiu demando ne facile respondeblas, sed ekzistas teorioj ke bona teamo konsistas el 7+- 2 homoj. Unuoj de 7 ankaŭ troveblas denove kaj denove en aliaj kunteksto. Ne estas hazardo, ke ĉi tiu nombro respondas al la memorkapablo de la homa cerbo. Ni memoras 7 +/- 2 aferojn — ĉu ili estas telefonnumeroj aŭ datumoj. Psikologie, ĉi tiuj estas "pecoj", unuoj en mallongdaŭra memoro. Tial la psikologo George Miller nomis ĉi tiujn la "magiaj sep". La nombro ankaŭ nomiĝas numero de Miller. En la militistaro estas ofte unuoj de ok (7+1) - kun komandanto (8+1).

Ekzemple en mia entrepreno oni nun grupigas homojn laŭ principo de fleksebla organizo en malgrandaj projektoteamoj, triboj kaj kapituloj, kiuj estas esencaj strukturaj elementoj de la fleksebla organizo:

Tribo = grupo de pluraj teamoj kun konsekvenca respondeco por komuna celo

Teamo = provizora asocio de dungitoj kun konsekvenca respondeco por iu celo (angle: "Squad")

Kapitulo = algrupigo de dungitoj laŭ kapabloj. La dungitoj estas ordigitaj en kapituloj (angle: "chapter")

La fleksebla organizo estas pluevoluo de la 'klasika' organizado laŭ linio, kie disciplinara kaj faka gvidado estis nur en unu mano. La organizo laŭ projektoj estas hibrida formo de organizo kie homoj parte laboris en sia regula tereno, kaj partempe por projektoj kun templimo. Do oni povas distingi inter tiuj tri organizoformoj:

Linia organizo: Linia organizo estas strukturita hierarkie kaj linie, tiel ke ĉiu dungito ricevas instrukciojn de klare difinita superulo.

Projektoorganizo: La projekta organizo supermetas la ekzistantan linioorganizon praktike kaj provizore. La instrukcirilatoj respondas al la linioorganizon.

Fleksebla organizo: En la fleksebla organizo, la antaŭa linia organizo estas dissolvita kaj nova organiza unuo estos kreita. Estas apartigo inter disciplina kaj teknika / faka aŭtoritato doni instrukciojn.

La esperantaj asocioj kaj principe UEA estas strukturitaj laŭ klasika linia organizo en naciaj organizoj, komitato, estraro, oficejo de UEU, ĝenerala direktoro ktp. Oni povas demandi sin ĉu tiu fiksa organizo ankoraŭ taŭgas por vekti intereson kunlabori inter la esperantistaro kaj kiel ĝi povus esti pluevoluigita. Sama demando validas por aliaj asocioj kun strikte linia organizoformo.

Rigardante nun al nia klubo mi ja povus imagi kvar fakajn teamojn, nome redakto-teamo, biblioteka teamo, grupliga teamo kaj internacia teamo, ĉiuj kun la sekvaj taskoj:

Redakta teamo: eldono de la Esperanto-Infomilo, flego de la kluba retpaĝo, publikaj anoncoj, gazetara laboro

Biblioteka teamo: vartado de nia biblioteko, katalogizado de libroj, pruntedono de libroj kaj abonitaj gazetoj, kunlaboro kun aliaj bibliotekoj,

Grupliga teamo: por grupligaj celoj ĝi planas lokajn eventojn kaj ekskursojn, aŭ partoprenon al lokaj eventoj kiel interkultura semajno aŭ niaj jubileaj festoj, ofertas lokajn lingvokursojn aŭ lingvo rondojn, varbas novan membrojn,

Internacia teamo: planas grupvojaĝojn, flegas kontakton kun Eo-organizoj kaj esperantistoj de partneraj urboj. invitas gastprelegantojn, ktp.

Ĉiu teamo agu memstare en siaj decidoj, planoj kaj realigadoj - kaj respondecas nur al la membrokunsido. Post kiam la teamoj el volontuloj estos formiĝintaj kaj eklaboros, tiam estos realigita tiu strukturo de fleksebla organizo. Sekve de tio, la estraro estos liberigita de multaj temporabaj gravaj taskoj, pri kiuj do zorgos en daŭra kaj klarvidebla maniero la fakaj teamoj.

Plano por la rekatalogado kaj revivigo de la kluba biblioteko

Eseo de Rubeno Fernandez Asensio

Unua parto

Tra la tuta mondo, Esperantaj kluboj kaj asocioj velkas pro la konkurado de la interreto: kiel logi membrojn, se danke al la novaj komunikiloj la individuoj jam povas rekte uzi la lingvon internacie? Kluboj devas proponi novajn servojn taŭgajn al la membroj de diaspora lingva komunumo, servojn ne rekte disponeblajn al individuoj. Unu el ili povas esti la funkciigo de kluba biblioteko kun pruntoservo.

Publikaj bibliotekoj, ĉar estas publike financataj, kutime disponigas librojn nur en la loka lingvo kaj foje en kelkaj tre disvastiĝintaj fremdaj lingvoj; la plej avangardaj servas ankaŭ la bezonojn de loke gravaj komunumoj de enmigrintoj, sed esperantistoj nenie estas sufiĉe multnombran por meriti tiun atenton. Eĉ en lokoj kun publika apogo por nia lingvo, kiel Herzberg am Harz, necesas venki la malintereson kaj rezistemon de bibliotekistoj por bazaj taskoj, kiel katalogado tiel, ke Esperantaj libroj estu vere alireblaj. Pli ĝenerale kaj laŭ mia sperto, donaci Esperantajn librojn al publikaj bibliotekoj estas senfrukta strategio: neniu libro estas senpaga por bibliotekistoj, ĉar ĝi prenas labortempon de

dungitoj por katalogi kaj ankaŭ spacon en la bretoj (tio estas, kostoj de konservado, hejtado, ktp); tial malofte legataj libroj estas periode elsarkataj. Sekve, se niaj organizoj ne starigos kaj flegos siajn proprajn bibliotekojn, esperantistoj povos legi nur tiujn Esperantajn librojn kiujn ili persone posedos. Jen do ŝanco por lokaj kluboj.

La Frankfurta klubo jam posedas bazon por starigo de biblioteko. En subtera ĉambro en Saalbau, ĝi posedas tri ŝrankojn preskaŭ plenajn je libroj de diversaj aĝoj kaj genroj. La 19an de Decembro mi havis ŝancon tre rapide inspekti ĝin kaj, kvankam kompreneble ne eblis kalkuli ilin, mi dirus ke troviĝas tie proksimume dek metroj da libroj. Multaj el ili havas etiketojn gluitajn sur la spino kaj onidire ekzistas katalogo, eĉ cifereca, sur ies komputilo, kaj presita kopio ie sur la bretoj (tamen mi ne havis tempon ĝin serĉi). Katalogo estas grava diferenco inter vera publika biblioteko kaj privata kolekto; per katalogo respondeculoj povas kontroli la pruntadon de libroj evitante perdojn.

Kial do la jam ekzistanta katalogo ne sufiĉis por vivigi la kluban bibliotekon? Tre simple: kluba

biblioteko ne estas publika en la senco ke kiu ajn povas viziti ĝin por libere kaj sen hasto trarigardi la bretojn, preni librojn kaj foliumi ilin ĝis decidis pruntepreni iun; nur unu aŭ du fojojn en monato, dum klubaj renkontiĝoj, eblus persone traserĉi la kolekton kaj elekti libron, sed tio postulus tro da tempo kaj ĉeeston de respondeculoj. Plie, prunteprenontoj hezitus peti ke oni malfermu la ĉambron kaj la ŝrankojn nur pro scivolemo, ne serĉante precizan libron, krom se tia malfermado fariĝus kutima. Sekve, katalogo nur utilis se ĝi estos konsultebla antaŭ vizito por elekti la prunteprenotan libron; tute ne helpas havi ĝin nur presita papere en la ŝranko mem.

Eblus facile antaŭdisponigi la katalogon al la klubanoj se ekzistus cifereca originalo sendebla per reto aŭ, multe pli bone, rekte publikigebla sur la retejo de la klubo—kondiĉe ke ĝi estu en iu bone konata formato; praktike, taŭgus nur PDF, HTML, Word, OpenDocument aŭ simplatekstaj formatoj.

Ĉu tia cifereca katalogo vere jam ekzistas? Mi kontaktis s-inon Katarina Eckstadt por kontroli, ĉu vere ie en ŝia komputilo kuŝas la originalo laŭ tio kion Ulrich diris al mi, sed ŝi ne sukcesis tuj trovi ĝin. Se fine ŝi tamen trovos, restos kontroli, ĉu ĝi ekzistas en formato ankoraŭ legebla kaj alirebla, ĉar jam en la pasinteco okazis, ke antikvaj katalogoj de la kluba kolekto fariĝis tute neuzeblaj pro rapida teknologia kadukiĝo. Povus esti, ke la programo uzita por krei ĝin ne plu estas ĝisdatigata nek instalebla sur novaj komputiloj, kio postulos komplikajn elmigradon. Atinginte tion, ankaŭ restos la longa laboro kompari la katalogon kun la libroj vere ekzistantaj en la ŝrankoj, ĉar estas tre probable, ke ĝi ne plu estas ĝisdata, se libroj perdiĝis aŭ novaj estis aldonitaj. Kaj fine, restante ĉe la malnova katalogo, necesos kontentiĝi pri la eraroj kiuj preskaŭ certe enŝteliĝis, ĉar ĝi nepre estis la laboro de lacaj amatoroj.

Jen do mia aŭdaca demando: anstataŭ tiu longa serĉado, elmigrigo kaj ĝisdatigado de la malnova

katalogo, kial ne rekomenci de nulo, se tiu rekomenco estos pli rapida kaj plie havos la du avantaĝojn, ke ĝi utiligos la laboron de profesiaj katalogistoj kaj ĝia progreso estos tuj videbla sur interreto sen atendadi la finon? La kundividaj eblecoj de Interreto tute ŝanĝis la manieron labori en publikaj bibliotekoj; dum antaŭe ĉiu biblioteko devis havi profesinivelan katalogiston, nuntempe la principo estas alia: katalogi nur unu fojon por ĉiam, je la plej rigoraj kriterioj, kaj poste redistribui kaj kopii tiun altnivelan priskribon tra la Interreto. Kiel simpla Esperanta klubo, sen mono aŭ teknologia kompetentulo, povus imiti tiun proceduron?

Antaŭ ol daŭrigi per praktikaj detaloj, necesas iom teoriemi kaj pli klarigi kio fakte estas katalogi. Ana Manero, profesia katalogistino de la Hispana Nacia Biblioteko kaj de la Biblioteko Juan Regulo Perez de Hispana Esperanto-Federacio, difinis ĝin en sia 2011 eseo *Ĝenerale pri katalogado* kiel tri-ŝtupan taskon, respektive:

1. Priskribi dokumenton por certigi ties identigeblon.
2. Decidi kiuj estos la alirpunktoj kiuj permesos ordigi kaj trovi ĝin en la indeksoj de la katalogo.
3. Doni la bezonatajn indikojn por trovi la originalan dokumenton ene de la kolekto.

Pri la du lastaj fazoj mi ne skribos nun, ĉar ili postulas pli longan klarigadon. La unua estas pli simpla kaj memkomprenebla: antaŭ ĉio, tutsimple necesas scii kiuj verkoj ekzistas en la biblioteko kaj iom priskribi ilin; tamen la diablo kuŝas en la detaloj. Kiam temas pri famaj beletraj klasikaĵoj, ofte titolo kaj nomo de aŭtoro sufiĉas por identigo, sed tipa biblioteko kutime inkluzivas ankaŭ malpli konatajn librojn, kiuj postulas pli detalan priskribon, por ke la katalogo donu ioman ideon pri ilia karaktero sen bezono rekte inspekti ilin. Plie, se temas pri famaj verkoj, ankaŭ oftas la kunesto de malsamaj eldonoj, malsamaj tradukoj, aŭ versioj en malsamaj genroj (komikso, teatro, prozo...). Ĝenerale, ju pli granda estas la kolekto, des pli

detala devos esti ĝia katalogo por distingi ĉiun varianton inter si; tial, kiam estas ia ebleco ke la kolekto kreskos en la estonteco, indas pliprecizigi la priskribon ekster la nuntempaj bezonoj. Kompreneble, tio postulas pli da laboro, kaj necesas trovi ekvilibron inter detalemo kaj ekonomio: kluba biblioteketo neniam devos aŭ povos esti katalogata kiel la gigantaj kolektoj de la Germana Nacia Biblioteko.

Ekzistas programoj por bibliotekaj katalogoj kiuj kontentigas ĉiujn tri bezonojn de katalogado, kaj eĉ ankaŭ aliajn funkciojn de publikaj bibliotekoj, kiel ekzemple pruntokontrolon; tia estas Koha, la programo elektita de Ana Manero por la biblioteko JRP. Tamen Koha kaj similaj programoj estas ekstreme kompleksaj kaj postulas profesinivelan servil-mastrumadon, kian Esperantaj asocioj ne povas kutime permesi al si. Tial mi pli proponas utiligi la eblecon de pli modesta programo: Zotero. Ĝi ne estas kreita por publikigi bibliotekajn katalogojn sed nur por kompili bibliografiojn, tio estas, listojn de libroj, artikoloj, kaj aliaj publikigitaj fontoj de akademia esplorado. Ĝin uzas universitatoj por kompili la finan liston de fontoj uzitaj kaj cititaj, kiun ili metas ĉe la fino de siaj disertacioj kaj artikoloj; tial ĝi utilas nur por la unua parto de katalogado, la priskriba, sed tion faras sufiĉe efike, kiel mi tuj montros.

Zotero estas datenbanka programo esence ne tro malsimila de Microsoft Access kaj aliaj tiucelaj, kiun oni instalas sur sian propran komputilon; ĝi funkcias sur Vindozo, Makintoŝo, Linukso kaj iOS. Ĝi ofertas la bezonatajn kampojn por identigi enorman diversecon da fontoj uzablaj en akademia esplorado: publikigitaj libroj, doktoraj disertacioj, ĉapitroj de libroj, artikoloj en fakaj ĵurnaloj, gazetaj artikoloj, enciklopediaj artikoloj, konferencaj referaĵoj, leĝoj, juraj kazoj, manuskriptoj, arĥivaj dokumentoj, televidaj aŭ radielsendaj programoj kaj eĉ blogaĵoj aŭ podkasto. Tamen, por niaj celoj ni kompreneble limigos nin al la kampoj plej necesaj por priskribo de libroj: titolo, aŭtoro, kontribuinto, redaktoro, tradukisto, resumo, serio, serinnumero,

volumo, volumnumero, eldono, eldonloko, eldonisto, dato, paĝonombro, lingvo, ISBN, mallonga titolo.

Se en la sama komputilo la uzanto instalas la Zotero-etendaĵon por Microsoft Office aŭ LibreOffice, dum verkas tekston per tiuj tekstoprocesiloj li/ŝi povas enŝovi referencojn al la libroj en Zotero apud la citaĵoj kaj fine aldoni kompletan bibliografion de cititaj verkoj per unu musklako. Tamen, por ŝovi referencojn en tekston, unue necesas plenigi la datenbankon je bibliografiaj rikordoj priskribantaj verkojn. Tion oni povas fari laŭ la tradicia maniero, mane tajpante la datenojn de ĉiu citota verko, sed kompreneble estus multe pli efike plenigi la datenbankon de Zotero aŭtomate nur per unu musklako, ĉu ne? Kaj ĝuste tion oni povas fari se nia komputilo estas konektita al interreto kaj la libro katalogota havas iun normigitan identonumeron (kutime ISBN); Zotero estas agordita por konekti sin al la katalogoj de kelkaj gigantaj bibliotekoj kiel la usona Library of Congress, tiel ke sufiĉas entajpi tiun numeron kaj alklaki butonon rekte en Zotero por, "aŭtomagie", kopii en nian datenbankon la tutan rikordon de la libro kun siaj datenoj eĉ sen bezono viziti la retejon de Library of Congress. Jen nekredebla tempoŝparo!

Certe ISBN ĝeneraliĝis nur en la sepdekaj jaroj kaj pli malnovaj libroj malhavas ĝin. Ankaŭ povas okazi, ke la rikordo el Library of Congress ne estas sufiĉe bona aŭ kompleta (ĉar farita de neesperantistoj) kaj ni preferus pli bonkvalitan rikordon. En ambaŭ kazoj ne malesperu: sufiĉas instali sur la saman komputilon alian etendaĵon: Zotero Connector. Per ĉi tiu etendaĵo, Zotero povas komuniki kun via retumilo (Mozilla Firefox, Google Chrome, Microsoft Edge aŭ Apple Safari), kaj per tiu komuniko vi povos utiligi la plej bonajn rikordojn troveblajn tra la tutmonda interreto.

La plej multaj serviloj de profesinivelaj publikaj katalogoj, kiam kreas retpaĝon por videble montri la rezultojn de serĉo, ankaŭ injektas nevideblan HTML-kodon en la rezulto-paĝon

mem kiu redonas la plej gravajn bibliografiajn datenojn el la montrataj verkoj. Taŭgaj programoj instalitaj en la retumilo mem kapablas detekti tiujn datenojn kaj sciigi la uzanton per butono kiu proponas importon de la rikordoj. En la kazo de Zotero Connector, la butono aperas kiel blua libreto en la adresbaro de la retumilo kiun oni povas alklaki por tuj kaj senpere importi la rikordon en nian lokan Zotero-datenbankon (se Zotero mem estas malfermita). Kiam la retpaĝo montrata ne estas slipeto de specifa libro sed listo de serĉ-rezultoj, la butono fariĝas flava dosierujo, kaj alklakante eblas elekti ĉiujn montratajn rezultojn aŭ nur kelkajn por importi samtempe ĉiujn elektitajn rikordojn per plia musklako. Tio signifas ke por ĉiu libro trovata en la kolekto, sufiĉos serĉi ĝin en bona katalogo kie ĝi ankaŭ povas troviĝi por tuj importi profesie faritan rikordon de ĝi en nian bibliotekon.

Ne ĉiuj katalogaj serviloj proponas tiun magion. Koha ja povas, kio signifas ke Zotero povas importi rikordojn el la katalogo de la biblioteko JRP, el la biblioteko Carlos Domingues de Brazila Esperanto-Ligo, kaj el la komuna katalogo de Kataluna Esperanto-Asocio. Ankaŭ preskaŭ ĉiuj universitataj katalogoj subtenas tiun eblecon, ekzemple tiu de Universitato Goethe; same okazas pri naciaj bibliotekoj kiel la germana aŭ la aŭstria (la lasta inkluzivas la Vienan Esperanto-Muzeon). Alia taŭga fonto por Zotero estas RERO (la reto de popolaj franclingvaj svisaj bibliotekoj inkluzivanta la katalogon de la Centre d'Etude de la Langue Internationale en La Chaux-de-Fonds) kaj Worldcat, la tutmonda meta-katalogo de katalogoj. Aliflanke, aliaj katalogoj ne ofertas tiun eblecon, inter ili la katalogo de popolaj frankfurtaj bibliotekoj, kaj en tiuj kazoj Zotero nur proponas kopii ligilon al la retpaĝo; tamen la elekto estas sufiĉe vasta por ke ne manku bonaj rikordoj de la plej oftaj esperantaj libroj, foje faritaj de profesiaj esperantistoj-bibliotekistoj.

La leganto jam povas kompreni kiujn eblecojn malfermas ĉi tiu strategio; sufiĉas unu malnova portebila komputilo kun interreta konekto kaj la

programoj Zotero kaj Zotero Connector instalitaj por komenci katalogi. Necesas nur serĉi ĉiun libron de la kolekto en bonaj interretaj katalogoj, identigi la verkon kaj eldonon kun absoluta certeco kaj precizeco, kaj importi ĝin per musklako sen bezono de teda kaj erarplena mantajpado.

Atenta leganto rimarkigos, ke Zotero permesas rapide refari tutan katalogon, sed ne solvas la ĉefan bezonon difinitan en la komenco de ĉi tiu eseo: kiel rete publikigi la katalogon por distanca konsultado? Prava plendo, kontraŭ kiu mi rezervis atuton: la disvolvanto de Zotero (usona neprofitcela organizo) ankaŭ disponigas al ties uzantoj ttt-ejan servilon ĉe zotero.org, en kiu ili povas krei konton por alŝuti siajn bibliografiojn kiel retpaĝojn; se oni ne bezonas alŝuti dokumentojn kaj PDF-ojn al la serviloj de zotero.org, la servo estas senpaga. Tiel, uzanto povas alŝuti rikordojn el malsamaj komputiloj en la saman bibliografion kaj, ĉar la akordigo inter servilo kaj komputilo(j) estas ambaŭdirekta, poste havi la saman bibliografion en ĉiuj aparatoj. Ankoraŭ pli: oni povas fari sian personan bibliografion publika kaj videbla al ĉiuj kiuj konas ties retadreson, sen bezono de konto kaj ensaluto en zotero.org. Fine, la sistempo ebligas ankaŭ grupajn bibliografiojn, privatajn aŭ publikajn, konstruatajn kaj mastrumatajn de pluraj homoj. Tiel, pluraj katalogantoj povas katalogi samtempe la saman kolekton, ĉiu per propra komputilo kaj propra Zotero-konto, kaj tiel multobligi la rapidecon de la laboro; plie, ne necesas atendi la finon de la katalogado por ke la intertempa rezulto estu jam videbla sur interreto.

Mi esperas ke ĉi tiu plano konvinkos multajn, kaj baldaŭ pluraj volontuloj komencu katalogi la kluban bibliotekon. Tamen memoru ke bibliografia priskribo estas nur la unua ŝtupo de katalogado. Pri la restantaj solvotaj problemoj mi skribos en alia okazo.

Aŭtoro: Rubeno Fernandez Asensio

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Juĝisto al la akuzato:

- Ĉesu do fari ŝercojn. Ĉu vi volas kredigi al mi, ke vi pensis, ke la monujo apartenis al vi?
- Ne la monujo, sinjoro juĝisto. Kiam mi ekvidis la monbiletojn en ĝi, ili ŝajnis esti bonaj konatoj al mi.

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi hodiaŭ prezentas estas: 'Al la papero ne mankas tolero'.
En la germana lingvokomunumo oni ankaŭ diras 'Papero estas pacienca'

Ankaŭ la senco de tiu proverbo estas memevidenta kaj indikas ke projekto aŭ interkonsento povas esti surpaperigita sufiĉe facile kaj iam ajn. Tamen, kiam kaj ĉu la projekto estas efektivigita aŭ interkonsento estas aliĝita estas alia afero. Do malantaŭ la diro 'Al la papero ne mankas tolero' staras, ke multaj aferoj povas esti facile skribitaj sen devus havi iujn sekvojn. Cetere, ĉi tio validas ne nur por interkonsentoj, sed ankaŭ por malveroj.

Cicerono, al kiu ĉi tiu idiomaĵo reiras, venis al ĉi tiu konkludo. La antikva romia verkisto kaj politikisto skribis en siaj leteroj "epistula non erubescit", kiu tradukiĝas al "la letero ne ruĝiĝas". El la kompreno, ke letero ne konas honton kaj tial ne ruĝiĝas, venis la diro, ke papero estas aparte pacienca. Io ajn povas esti skribita sur ĝi.

Solvo de la enigmo el la lasta informilo.

En ja lasta informilo mi prezentis 16 asertojn, kiujn mi deklaris malĝustajn (kelkajn tute klare, aliajn nur iasence), kaj demandis, ĉu vi scias, kial ili malĝustas aŭ malĝustetas, kvankam unuavide, pluraj ŝajnis tute en ordo.

Jen ripeto de la frazoj kaj nun kun la solvoj:

(1) Dio kreis ĉion dum ses tagoj.

Laŭ la Biblio, Dio kreis ĉion dum ses tagoj. Escepte la ripozon. Tiun ri kreis nur je la sepa tago.

(2) Gutenberg inventis la libropresadon.

Gutenberg lernis la libropresadon en metiejo. Ĝi estis inventita ĉirkaŭ duonan jarmilon antaŭ la naskiĝo de Gutenberg. Li "nur" inventis la libropresadon per disigeblaj literblokoj, kio faris la libropresadon multe malpli kosta kaj tiel kaŭzis grandan plivastigadon de libroposedo.

(3) Ĉokolado, kafo, maizo, terpomoj kaj tomatoj venis el Ameriko.

Ĉokolado, maizo, terpomoj kaj tomatoj venis el Ameriko. Kafo venis el Afriko.

(4) Ĝejmz Ŭot inventis la vapormaŝinon.

Pluraj personoj kreis vapormaŝinojn antaŭ James Watt. En Britujo ekzemple s-ro Newcomen. En Egiptujo jam 1500 jarojn antaŭe estis vapormaŝinoj faritaj de Heron de Aleksandrio

(5) Usono estis la unua demokratio.

Laŭnomaj demokratioj ekzistis jam pli ol dumil jarojn antaŭe, ekz-e en Grekujo kaj en Mesopotamio. Tiu en Usono dum ĉ. 1800 similis al ili en tio, ke nur terposedantaj viraj blankuloj havis voĉdonrajtojn, do nur malmultaj elcentoj de la tuta plenkreskula loĝantaro. Demokratioj en la hodiaŭa senco estiĝis nur post 1900, kiam sklaveco estis forigita kaj pli kaj pli landoj enkondukis balotrajtojn por ĉiuj tavoloj de la societo kaj por virinoj. Tion Usono faris post landoj kiel Novzelando, Turkio kaj Germanujo. En Francujo virinajn voĉdonrajtojn oni eĉ nur donis post la dua mondmilito. La lasta amerika aŭ eŭropa lando doni balotrajtojn al virinoj en ĉiuj balotoj estis tamen Svisujo.

(6) Homoj devenas de simioj.

Homoj kaj simioj devenas de komuna praspécio, sed ne de simioj.

(7) Karl Benz inventis la aŭtomobilon.

Karl Benz konstruis la unuan aŭtomobilon uzantan benzinan brulmotoron. Aŭtoj pelitaj de vapormaŝinoj tamen jam ekzistis kelkajn jardekojn antaŭe en Britujo. La unuan aŭton tamen demonstraciis pli ol cent jarojn antaŭe la franco Cougnot. Li volis vendi ĝin al la franca armeo, sed kvankam li ricevis ŝtatan premion por sia invento, la armeo poste ne utiligis ĝin.

(8) Fungoj estas plantoj.

Fungoj ne estas plantoj, sed aparta vivaĵa regno.

(9) Albert Ejnŝtajn inventis la relativteorion.

Albert Ejnŝtajn la relativteorion formulis, sed ne "inventis". Li priskribis per matematika-fizika modelo la rezultojn de eksperimentoj faritaj dum duona jarcento. Kromnoto: tiujn eksperimentojn multaj fizikistoj el pluraj landoj estis farintaj dum kvin jardekoj por analizi la naturon de lumo. Ejnŝtajn estis unu de tiuj homoj kiuj interŝanĝis sciojn, formulojn kaj ideojn pri tiu temo. Ke li sole havis la tempon tiujn rezultojn sume priskribi per unu kohera koncepto venis de tio, ke la aliuloj devis universitate labori kiel profesoroj, do ne havis multe da libera tempo por fari tion. Kontraste al Ejnŝtajn, kiu havis 9-al-5-an simplan laboron kiel patentoficisto. Tiel li povis ĉiutage ordigi la faktojn, priskribi la tuton formule, kaj gajni la tutan renomon sole.

(10) La Papo subtenis la kandidatiĝon de Donald Trumpo.

Ke la Papo subtenas la kandidatiĝon de Donald Trumpo estis falsa novaĵo kreita de usonaj respublikanoj kaj ties amaskomunikiloj dum la antaŭlasta antaŭprezidentelekta periodo.

(11) Trinki desinfekciaĵon helpas kontraŭ virusa infekto.

En 2020 tiu sama Donald Trumpo publike asertis, ke trinki desinfekciaĵon helpas kontraŭ la kronvirusa infekto. Kuracistoj poste avertis la homojn ne fari tion.

(12) Angela Merkel estas la filino de Adolf Hitler.

Ke Angela Merkel estas la filino de Adolf Hitler estis iam furora falsa novaĵo inter iuj konspirteoristoj en la interreto.

(13) La Kronviruso estas invento de konspiruloj por vaccine enĉipigi kaj tiel sklavigi la homaron.

Ke la Kronviruso estas invento de konspiruloj por vaccine enĉipigi kaj tiel sklavigi la homaron estas kredata de surprizige multaj homoj, kvankam ili ĝis hodiaŭ ne eĉ prezentis ajnan pruvilon por tiu ideo.

(14) Putin subtenas Ukrainion por kontraŭbatali ties faŝisman registaron.

Putino jam militokomence diskonigis la interpreton, ke Rusujo subtenas Ukrainion por kontraŭbatali ties faŝisman registaron, por pravigi kaj pliakceptigi la invadon en Ukrainio, kiun li estis planintaj jam delonge por rekonkeri ĝin. Aldone li eĉ leĝe malpermesigis nomi tiun invadon "milito".

(15) Sunenergio estas renovigebla energio.

Energio ne estas renovigebla. Ĝia kvanto restas ĉiam la sama, tamen, ĝia formo povas ŝanĝiĝi. Dum tiu transformiĝo de la energio ĝia kvalito povas malkreski, t.e., ĝia kapablo efiki fizikan laboron. Laŭ la dua leĝo de termodinamiko, tiu kvalitoperdo ne estas renversebla. Oni do ne povas renovigi energion en ajna senco.

(16) Ĉiuj homoj estas egalaj.

Ĉiuj homoj estas unikaj, do ne egalaj (ne eĉ ĝemeloj). Laŭleĝe, almenaŭ en multaj landoj, ili tamen havu la samajn jurajn rajtojn.

Enigma de Januaro (sendita de UF)

BONAN
+ TAGON

SALUTO

Ĉu vi scias kiel adicii? Ĉiu litero en ĝi estas anstataŭigebla per unu el la ciferoj 0...9, ĉiu cifero ĉiam per la sama litero.

BONAN do reprezentas 5-ciferan nombron. La tria kaj kvina ciferoj estas samaj.

La dua cifereco de la dua nombro, TAGON, estas la sama kiel la kvara en BONAN.

SALUTO estas la sescifera rezulto, la sumo de la du supraj nombroj.

Bonvolu ciferigi la kalkulon.

La novaj ŝuoj

de Ulriko Felmano

Kiom da irado. Kurado. Marŝado.

Ĉiam denove la bezono prirabi la kamparanojn por havi manĝaĵon.

Kaj la ŝuproblemo. Eĉ pli facilas produkti novan vestaĵon.

Sed ŝuojn.

Ili devas esti tre bone kongruaj al ĉiu piedo. Bone faritaj. El bona ledo. Kun tre stabila fadeno. Oni bezonas taŭgan ilaron. Konojn. Spertojn. Tempon. Kiu sciintus!

Kiam ni antaŭ du jaroj ekmarŝis de nia ĉefurbo, mi havis tutnovajn ŝuojn. De Mardrubal, la plej bona (kaj multkosta) ŝufaristo de Kartago. Estis klare ke indus kunhavi duan paron. La plano por nia granda tasko estis: iri tra nia Iberio kaj laŭ la greke kontrolita suda Gaŭlujo al Romio. Necesis prepari por la Alpmontaro, jes. Tiun ni devis transiri kun niaj elefantoj. Ni subtaksis tion. La Alpoj pli vastas kaj pli altas ol la Atlaso.

La plano diris: post la traĵo de la Alpoj, marŝu Rom-direkten ĝis la romianoj venas por batali, venku ilin, detruu la urbon, fino.

Ni trairis. Ni marŝis. Ni renkontis. Ni venkis. sed la romiaj soldatoj retiriĝis antaŭ ol ili estis tute venkitaj.

Ekde tiam ni sekvas ilin. Marŝadas. 40 kilometrojn. Ĉiutage. Ili fuĝas. Ni sekvas. La ŝuoj el Kartago jam delonge rubiĝis. La novajn ni parte aĉetas de italaj metiistoj, parte provas produkti mem, en la armeo. Ledon ni sufiĉe havas, la plej multaj de niaj elefantoj jam mortis. Sed niaj plej multaj ŝufaristoj ne estas lernintaj profesiuloj. La Etruskoj estas bonaj ŝufaristoj. Pro tio mi aĉetas iliajn. Ili ankaŭ liveras al la Romianoj. La ŝuoj ludas gravan rolon. Oni facile subtaksas tion.

Mi ĵus aĉetis novan paron. Ili aspektas kaj sentiĝas tre bone. Sed en batalo oni ne havu novajn ŝuojn. Ili bezonas tempon ĝis ili perfekte taŭgas al la propraj piedoj. Sed kion nun fari? Neniu scias, kiam la decida batalo kontraŭ la romianoj okazos. Ni jam sekvis ilin dum ses monatoj. Tiuj poltronoj! Ili defiis la Grandan Kartagon. Kaj nun malkuraĝas batali. Ni forviŝos ilian orgojlon kiel tiun de la revoltintaj grekaj urboj sur Sicilio. Mi do ne tuj surmetu la novajn ŝuojn por plene taŭgigi ilin. La romianoj devas baldaŭ batali. Hanibalo decidis ne plu sekvi la romian "armeen", kiu ne volas batali, li iros Romon kaj detruos ĝin. Tiam la romianoj devas veni por batali. Ili sekvos nin anstataŭ inverse. Post nia venko mi ekuzu la novajn ŝuojn.

Kiom ofte ŝi estis leginta tiun leteron. Estis la lasta, kiun ŝi estis ricevinta de ŝia frato.

